

9-a JARO, N-o 395 LEIPZIG, 20./10. 1932

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS dusemajne | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lehner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS dusemajne

LA USONA IMPERIISMO

Usono deklaris al la mondo la militon. Eŭropo estas en milita stato kun Usono. Tiun fakton nei iĝas pli k pli malfacile. Ĉiutage la eŭropaj ĵurnaloj sciigas al ni pri novaj borsvaloraj altiĝoj, deklaroj de s-o Huver, usona „movado“ ktp. Tio signifas evidente, ke Usono sen tradicia militdeklaro militas kontraŭ Eŭropon.

La parto de Usono en la mondproduktado leviĝas al 33 %. Ĝia parto en la produktado de l'ĉefaj krudmaterialoj estas multe pli alta. La produktado de ŝtonkarbo, fandfero, ŝtalo, zinko, plumbo k tabako reprezentas proks. 40 % el la mondproduktado, de kupro k kotono proks. 50 %, sed tiu de maizo 60 % k tiu de petrolo pli ol 70%. Tiuj nombroj signifas, ke la usonanoj estas tre riĉaj k tre fortaj. Sed ili signifas ankaŭ, ke, kiu havas parton de 33 % en entrepreno, tiu ĝin estras; lando reprezentanta 33 % el la produktado de l'tuta mondo, decidas pri bonfarto aŭ malbonfarto de ĉiuj.

Laŭ tiuj nombroj oni devas kompreni la novaĵojn alvenantajn el Usono. Kia estas la usonana taktiko? Ili ne restas longtempe malaktivaj. Ili estas riskemaj. Se ili perdas parton, ili ne malkuraĝiĝas, sed ili rekomencas. Finjulie la situacio estis jena: 10 milionoj da senlaboruloj, akcioj preskaŭ nulvaloraj, paralizitaj bankoj, 100 mil entreprenoj minacataj de likvido aŭ bankroto, buĝeto kun deficito 74-miliarda, armeo el eksmilitantoj, kiu marŝas kontraŭ la ĉefurbon. Kaj la aktivo? Konsiderinda ŝparaĵo ne uziĝanta k sento, ke la plej malalta punkto estas atingita; plie prezidanto, kiu volas esti reelektata kun stabo el financaj konsilistoj, kiuj ne akceptas la malvenkon k volas gajni monon.

La registaro, utiligante la konfidon en renaskiĝo, estigas firman kreditorganizon. La ŝtataj bankoj helpas la privatajn, kiuj siaflanke subtenas sian klientaron. Oni pruntas monon al la fervojoj, fabrikantoj k pograndaj marĉandistoj. Subtena komitato stimulas la plivaloriĝon de l'kapitalmono k de l'industriaj obligacioj. La publiko sekvas la movadon. Rezulte – la malaltiĝo estas barita. Oni forlasas la periodon de inerto. Kaj kion oni bezonis por ricevi tiun rezulton? Fortostreĉon de fantazio k iom da aŭdaco. La cetero estas nur teknika detalo k skribludo.

Eŭropo sekvis tiun politikon kun multe da sindeteno k skeptiko. Oni parolis pri „proelekta“ plialtiĝo de valoroj k „nelogika“ movado, kvazaŭ elito da negocistoj k bankieroj ekentreprenus similan aventuron sen iuj garantioj pri sukceso k nur por komplezi al Huver! Oni parolis ankaŭ pri borsvalora altiĝo sen morgaŭo, tiom longe kiom ne estus plibonigita en la mondo la produkt-interŝanĝo. Kritikoj, kiuj entenas bonan porcion da eksperimenta saĝo. Certe la usonanoj komplete trompiĝis en siaj antaŭvidoj rilate la financan katastrofon de 1929. Sed, oni devas konstati, ke por la momento la subten-organismoj k la registaro estras la komencitan manovron; ili ja estas devigataj esti singardaj, ĉar oni preparas sin alvoki la ŝparularon por investi grandajn pruntojn.

Tio estas internpolitika afero; sed por sukcesi ĝi plilongiĝas eksteren. Kaj tie komenciĝas la usona strategio. La anglo-usona antagonismo estas karakterizita per la batalo inter la du monvalutoj. Ĉiuj lastatempaj okazintaĵoj, de la ŝuldopaga prokrasto-dekreto de Huver ĝis la riparpaga konferenco trans la nuligon de l'orvaluta bazo en Anglio k la vojaĝon de l'franca ministroprezidanto al Usono, turniĝas ĉirkaŭ tiu ĉefa fakto, kiel ĉirkaŭ akso iranta de Vaŝingtono al Londono.

Anglio perdis la duoblan superregadon ŝiparan k financan, kio signifas atentindan rompiĝon de l'ekvilibro en la mondo. Post ripoza tempo pro internaj zorgoj Usono rekomencas grandstilan ofensivon. Kun aŭ sen kanonoj, la militmetodoj estas ĉiam la samaj: dividi por regi. Usono semas la dividon ĉe la sojlo de la Ligo de Nacioj, dekretas pagprokrastojn, malpermesas prefer-akordon inter Francio k Belgio, interkonsenton pri agado inter Francio k Anglio en Lozano, ktp.

La plano pri resanigo k reorganizado de l'usona ekonomio entenas la enkondukon de kvintaga semajno, kiu donus laboron al triono proksimume el la 10 milionoj da senlaboruloj. Sed se la konkurenclandoj ne agus simile, Usono devus riski malsuperon. Nu, ĝuste en Eŭropo oni komencas nun serioze pritrakti la ĝeneralan redukton de l'labortempo ĝis 40 horoj, kio esence egalas al la usona kvintaga semajno: ĉio do iras ankaŭ tiurilate laŭ la plaĉo k deziro de Usono, . . . k kvazaŭ laŭ ĝia instigo!

Kompiltraduko laŭ Ludoviko Lone (Lonay) en „Mondo“.

La XIII-a SAT-Kongreso okazos en Stokholmo. Baldaŭ aperos la unua Komuniko. Jam pripensu, kiel certigi vian ĉeeston al tiu brila manifestacio.

„Per la rapida plibonigo de ĉiuj produktiloj, per la senfine plifaciligataj komunikoj, la burĝaro tiras en la civilizon ĉiujn naciojn, eĉ la plej barbarajn. La malkaraj prezoj de ĝiaj varoj estas la peza artilerio, per kiu ĝi la ĉinajn murojn disfaligas, per kiu ĝi devigas kapitulaci la plej obstinan fremdulmalamon de la barbaroj.“

K. Marks.

IMPERIISMO EN SUD-AMERIKO

Ekonomiajn militojn ĉiam antaŭas soldataj militoj. Suda Ameriko estas unu el la „frot-zonoj“ inter Usona k Britia Imperioj. La preskaŭ certa milito inter la du sudamerikoj respublikoj — Bolivio k Paragvajo — ambaŭ sen ia marbordo, estas sendube, kvankam oni neniam mencias tiajn aferojn en la „bonmoraj gazetoj“, parto de la lukto inter la du financgrupoj.

Bolivio pensigas pri stano. Kiam proksiman fojon vi malfermos stanskatolon kun konservitaj piroj, persikoj, salmo aŭ sardinoj, pensu pri Bolivio. Kaj memorante, ke la scienco jam ebligis al la laborantaj amasoj, ke ili subtenu sin aŭ tute aŭ grandparte per stanumitaj anstataŭ freŝaj rikoltoj de la tero k maro, vi komprenos, ke la lokoj, el kie oni elfosas stanon, ne estas negravaj laŭ la vidpunkto de la mondekonomio.

La Boliviaj stanregionoj havas la due plej grandan amplekson en la mondo k nuntempe produktas 25 % el la mondprovizo. Ili estas tute posedataj de l'usona kapitalo, kiel ankaŭ estas la fervojoj, kiuj transportas ĝin trans Ĉilion ĝis la Pacifika marbordo, por tie ĝin surŝipigi. Bolivio mem estas bankrotinta, sed de Usono bone ekipata per armiloj k municio.

Paragvajo — bovbredado. Kiam vi proksiman fojon manĝetos vian „bovril“[1] kun biskvito, pensu pri Paragvajo. Via „bovril“ iam antaŭe vagadis tra la Paragvajaj ebenaĵoj. La kapitalo de tiu industrio estas preskaŭ tute brita.

La industriistoj de Bolivio deziregas la irrajton laŭ la Paragvaja riverego ĝis la Atlantika marbordo. Tiu vojo al la maro, kvankam pli longa, estas pli malmultekosta ol la fervoja vojo al la Pacifika oceano, ĉar tie la montaro Andoj baras la vojon. Do la Boliviaj k Paragvajaj kamparanoj k minsklavoj estas ekscitegitaj ĝis pasio de naciema sento k ĝis ekpostulo pri siaj „rajtoj“ rilate posedon de la regiono ĉe Granda Ĉako, — marĉeca terpeco, kies posedo signifas ankaŭ posedon de l'riverego k eblon atingi la Atlantikon.

Kaj ĉio — mizero k milito — nur por ebligi, ke la Stanaj Korporacioj povu sendi siajn produktojn pli facile k pli malkare ĝis la maro.

El la septembra n-o de l'revuo „Plebo“ (Plebs) ĉerpis L. B. (Leeds).

[1] „Bovril“ estas ia trinkaĵo el viandaĵo kun akvo. Mi pensas, ke ĝi estas mondkonata. *L. B.*

Feria tendaro por senlaboruloj

En la erikejo de Dalen (Dahlener Heide), en tendaro aranĝita de „Fiĥte“ (Naturamika opozicio) nun vivas 150 Gek-doj. Ili komune mastrumas. Por 35 pfenigoj tage oni ricevas matenkafon k tagmanĝon. Matene post la vekado oni iras al la lago por bani. Poste komuna gimnastiko. Per pilkludoj, ekskursoj, muzikado pasas la tagoj. Por ke oni ne asertu, ke oni nur traktas politikajn temojn, foje „grupo 6“ (vivreformuloj) devis kolekti fungojn. Sekvis leciono pri manĝeblaj k venenaj fungoj.

Al la tendaro ĉiu povas aparteni. Ne estas postulate, ke iu membro nepre apartenu al iu laborista organizo. La senlaboruloj estas oficiale liberigataj de la kontrolstampado k ricevas la kompletan subvencion.

Inter la partoprenantoj estas kelkaj esp-istoj, kiuj ne preterlasas la bonan okazon por propagandi esp-on. Ni jam estis vizitataj de K-doj el Riesa, Strehla k Halle. *98.*

Por ŝtopi la breĉon!

17. listo

13541	L. Weinguny (Vieno)	ŝil.	20.—
	K-dino G. de Bruin (Enschede)	guld.	1.—
16990	Ŝtekl J. (Kladno)	kr. ĉ.	10.—
13943	Stein G. (Dresden)	mk. g.	1.10
61	v. d. Heid (Dortmund)	mk. g.	1.—
17134	Linden (Zaandam)	mk. g.	1.67
	Kunveno de la Rotterdam-, Delft-, Hag-, k Scheveningen-anoj	guld.	8.50
1413	Schnurbusch (Leipzig)	mk. g.	—.50

Sovetmovado en ĉiniaj provincoj

En la julia n-o de „La Espero“, kiu estas eldonata en Hankovo (Suda Ĉinio), aperis raporto pri la klasbatala movado en Ĉinio, el kiu ni eltiras jenan interesan parton rilatan al la sovete administrataj distriktoj:

La Ruĝa armeo ĉe la provinclimoj de Honan-Anhui marŝadis antaŭen al la okcidenta parto de Anhui. Unue ĝi okupis Liŭan, poste (je la 12. majo) Cenjan, k la 15. majo Kuoĉin; ĉiuj estas grandaj k prosperaj urboj en Anhui. Dum batalo en Sociapu, la Ruĝa armeo tiel frakasis la blankan armeon, ke ĝi ekkaptis la diviziestron, du brigadestrojn k 6 regimentestrojn de la tuta blankarmea divizio, k akiris plie centon da maŝinpafiloj k unu radioaparaton.

Nun parto de la Ruĝa armeo antaŭenmarŝas al Ĉanpelin k Sengĉa en la suda parto de l'Tsin-pu (Tientsin-Pukov)-fervojo.

Malgraŭ ke superakvego detruis ĉiujn iliajn domojn, ilojn k agro-bestojn, la loĝantoj en la Sovet-distrikto de okcidenta Hunan-Hupej ne perdis la tempon por terkulturi. Parto de la semoj estis liverata de l'Soveta registaro, la reston ili aĉetis el siaj kooperativoj. La Soveta registaro liveris al ili pli ol 400 agro-bestojn k fondis fabrikon por fabriki terkulturilojn por ili. Nun en diversaj vilaĝoj oni trovas plugbesto-staciojn. La kamparanoj multe organiziĝas en „Helpo por Printempa Terkulturado“ aŭ „Atak-brigado“, por atingi bonan rikolton. Por rekonstrui k ripari la detruitajn digojn k irebligi la fluvojojn de l'riveregoj Jangce k Siang, la Sovet-registaro obligacias 300 mil arĝentajn dolarojn. La laboro estas nun duone plenumita. La loĝantaro en la Sovet-distrikto tre zorgemas pri ĉi tiu laboro k sindone klopodas en ĝi. Multaj laboras senpage laŭ sia deziro.

Ruĝarmeanoj estas liberigataj de terimposto. En ĉiu vilaĝo estas 20—30 mojoj (ĉina termezuro)[1] da nedistribuata tero, rezervata por la ruĝarmeanoj batalantaj en malproksimo. La vilaĝanoj kulturas la teron por ili, 70% el la rikoltaĵo estas liverataj al la familioj de ruĝarmeanoj k la loka Sovetregistaro konservas 30 % por la ruĝaj batalantoj kiel ilia necesa kapitalo, kiam ili rekomencos sian kamparan vivon estonte.

Oni fondas en diversaj vilaĝoj laborist-kamparanajn Klubojn, lego-klasojn, ĵurnal-legoklasojn, orator-salonojn, teatro-klubojn, laborist-kamparanajn vesperklubojn, Lenin-elementlernejojn k Kursojn por disciplini instruistojn.

[1] Bedaŭrinde la raportanto ne sciigas la valoron de tiu mezuro laŭ kvadratmetroj. — *Red.*

Pro tio ke en la provinco Ŝensi la nigra frosto kadukigis la tritikon, la popolomasoj en Ŝensi denove dronas en malsato kiel en la jaro 1929. La nutraĵ-prezoj duobliĝis dum unu monato. Kaj la Kuomintan-registaro, sub la preteksto, ke ĝi konstruos vic-metropolon en la provinca ĉefurbo Sian, pliintensigas la ekspluatadon al la tieaj amasoj per diversspecaj novaj impostoj.

Sed nun la tieaj loĝantoj ne plu estas tiel obeemaj kiel antaŭe. En marto, kamparanoj en la parto de l'Ŝensi-Kanso-limregiono sin organizis en revolucia kamparana armeo. Ĝi konsistis komence nur el unu roto da armeanoj, sed dum malpli ol tri monatoj ĝi fariĝis nevenkebla, starante kontraŭ 8 regimentoj de registara armeo. Multaj registaraj soldatoj ribelis k aliĝis la revolucian armeon. Ĉi tiu kamparana armeo estas nomata la 26-a Ruĝa armeo, k la distrikto, kiun ĝi okupis, fariĝis nova Sovet-distrikto.

Nombroj pri la mizeriĝo de la germana laboristaro.

Krom la „oficialaj“ 6 000 000 da senlaboruloj en Germanio ekzistas ankoraŭ 2 000 000 da senlaboruloj ne enkalkulitaj en la oficialaj nombroj. Ni montros per nombroj la staton de la diversaj grupoj de laboristoj. Ni prenas hodiaŭ la ekzemplon de senlaborulo, kiu jam dum 2 jaroj mallaboris. La nomo, pro konataj kaŭzoj, ne estas nomebla, sed tiu ekzemplo validas por miloj da senlaboruloj.

Senlaborulo F. L., edziĝinta, 2 infanoj, mallaboras depost junio 1930. Lia lasta salajro estis (semajne):

48 horoj po mk.g. 1.52	mk.g. 60.—
deprenoj mk.g. 6.55:	
por asekuro kontraŭ malsano	2.80
por asekuro kontraŭ senlab.	0.90
por asekuro kontraŭ invalid.	1.—
imposto	1.85
salajro pagata	53.45

Dum la unuaj 6 monatoj de senlaboreco la asekura subteno estis:

por li mem	mk.g. 22.05
por edzino k 2 inf.	mk.g. 9.45
do sume:	mk.g. 31.50

Post 6 monatoj, la asekura subteno finiĝas k la senlaborulo enviciĝas ĉe la krizaj senlaboruloj, kie la subteno grave malaltiĝas. De januaro—aŭgusto 1931 li ricevis krizan subtenon:

por si mem	mk.g. 14.65
3 familianoj	mk.g. 5.85
sume:	mk.g. 20.50

Tiu kriza subteno daŭras por senlaboruloj sub 40 jaroj 6 monatojn. Do depost septembro 31, la senlaborulo F. L. ne plu ricevas nek laŭasekuran senlaborulan subtenon, nek krizan subtenon. Post finiĝo de ĉiu ŝtata subteno, la senlaborulo estas subtenata de la komunuma „bonfarado“. Tiu subteno dependas de la bezono, de la mizero de la senlaborulo. La subteno de la bonfarado estas:

12 markoj por unu persono k
9 markoj por 3 familianoj
21 markoj sume.

Per la novaj eksterordinaraj dekretoj la subtenoj estas grave malaltigitaj je 15—25 %. Tiuj nombroj montras plej evidente la socian, ekonomian k kulturan mizeriĝon de la germana laboristaro. Estas klare, ke ne nur ne estas eble kontentigi la korpajn bezonojn, sed tute oni devas rezigni je ĉiuj kulturaj k sociaj necesaĵoj.

El la „Ruĝa Raportanto“, Hamburg-Altona.

Por ke „La Nova Epoko“ plu vivu!

17976 Raposo (Lisboa)	mk. g. —.78
1 Lanti	fr. fr. 50.—

Generaloj, prelatoj k „demokrataj“ regantoj festenas sur . . . kadavroputrejoj!

Dum aŭgusto, la franca registaro solene inaŭguris la . . . „nacian“ kadavroputrejon de Duomon (Douaumont) „honore“ al „la pli ol 400 000 francaj soldatoj“ falintaj sur la „honorkampo“, por defendi la urbon Verdun. Paroladis interalie la „Respublik“-estro Lebrun, la . . . „socialist“-respublikano Penlve (Painlevé) k la fama Paŭlo Bonkur (Boncour), ambaŭ lastaj kiel ministroj. Ili k marŝalo Peten (Pétain) gloris la „falintojn“ k malbenegis la militon. Lebrun mallaŭdegis la „grandajn homarajn frenezaĵojn, kia estis la milito de 1914—1918“ — kiun li helpis prepari! Penlve gloris . . . „ĝis kiuj plejaltaĵoj (!) devis supreniri la animo de „la soldato“, por silentigi la timtremojn de la karno, k . . . akceptigi al li, nekonatulo, sennomulo, la senluman k sengloran morton, kiu estas lia sola sorto“ (!)

Paŭlo Bonkur, kiel *ista* pacdemagogo, solenis, ke „la Soldato“ (!) de Verdun akceptis (!) morti, ĉar necesis, ke tiu estu la lasta milito; ĉar ties gajno estis la realigo (!!) de tiu supera espero: tio neniam plu revenu (!)“ Kaj Peten konkludis el tiu „realigo“, ke . . . „Ni havas la devon, prizorgi nian sendanĝerecon . . ; kiaj ajn estos la ŝarĝoj, kiuj rezultos el tio, ni devos havi la kuraĝon, akcepti ilin“.

TIO SIGNIFAS, ke ni devas ĈIAM PLI K PLI ARMADI, k tiel *prepari la proksiman novan „lastan“ „homaran frenezaĵon“!* . . . kiun, efektive, Lebrun, la eksa k la nuna *milit*ministroj Penlve k Bonkur *zorge preparadas*, per glorado de la militaj „virtoj“, per daŭrigo de la naciaj antaŭjuĝoj, k per malebligo de la malarmado.

Pri tiaj konkludoj el . . . porpacaj deklaradoj, ni ne plu devas miri! Burjen (Bourienne), sekretario de Napoleono, skribis en siaj „Memoraĵoj“: „Bonaparto sciis, ke la paco estas la sola celo de popoloj; kiam, en la fundo de sia penso, li *deziris la militon*, samtempe, li sentis, kiel grave estas, ke *li aspektu kiel pacdeziranto*“.

Eble ne ĉiuj militpreparantoj deziral la militon, sed, por kontentigi sian gloramon k konservi siajn bone pagatajn postenojn, ili ne hezitas trompi la popolojn k buĉigi ilin, por servi al la kanonvendistoj k aliaj kapitalistoj, kies helpon aŭ toleremon ili *bezonas*.

Sed plej abomena estis la tiuokaza . . . festeno!, kiun partoprenis, je la flanko de la 130 generaloj k 50 ambasadoroj, ankaŭ 50 *prelatoj!* k pri kiu burĝa „inform“-jurnalo skribis i.a. jenon: *„La manĝaĵoj estis delikat-elektitaj* k la *partoprenantaro brilega;* neniam tiom da *kardinaloj*, da marŝaloj, da generaloj, da *episkopoj*, da senatoroj, deputitoj k ambasadoroj troviĝis kunigitaj ĉirkaŭ sama tablo. *La spektaklo estis belega*“.

KION VI OPINIAS, GEK-DOJ, pri tiu „brilega“ ĉeestantaro, pri tiu festenado de kardinaloj k espiskopoj kun marŝaloj k generaloj, de niaj maldekstraj pacistaj! k . . . kontraŭklerikalaj regantoj kun tiom da pastroj k milit-ISTOJ? KION VI OPINIAS pri tiu ĜUO de „delikat-elektitaj manĝaĵoj“ k de „belega spektaklo“ sur . . . kadavroputrejo de 400 000 „falintoj“?

— — — — — — — — — —

Andreo Paris, *14 519.*

Laŭ artikolo en *La Homara Patrio* („La Patrie Humaine“).

Letero el Norda Afriko.

1.

Mi jam rakontis en la n-o 381 de „S-ulo“, ke la Nordafrika loĝantaro konsistas ĉefe el araboj, hebreoj, hispanoj k francoj. La naturaj enloĝantoj estas la araboj, kiuj tamen estas la plej ekspluatataj; la bienposedantoj estas preskaŭ ekskluzive francoj aŭ hispanoj. La hebreoj estas ĉefaj regantoj super la urba komerco.

En la kamparo la laboristoj estas araboj, kiujn dum la rikoltotempo ankaŭ helpas multaj eŭropanoj, ĉefe hispanoj. La labortago estas dek- ĝis dekdu-hora, la salajroj tre malaltaj. La vinberrikolto nun komenciĝis; plej bela pejzaĝo prezentiĝas antaŭ la okuloj de l'promenantoj; ĉie oni vidas grandajn vinberlaŭbojn, en kiuj pendas beraroj, kiuj havas pezon de du, tri k kvar kg. Mi laŭlonge iris tra multaj kilometroj, k oni vidas nenion alian ol vinberejojn kun centoj da rikoltantaj araboj. La fruktoj estas transportataj per specialaj grandaj aŭtomobiloj al ejoj, kie per novaj maŝinoj estas farata la vino: ĝi fluas de la maŝinoj, kiel la akvo fluas el la fontoj. La homo kolektas tiom da natura riĉaĵo per sia laborforto, sed bedaŭrinde la laboristoj, kiuj donis sian ŝviton, ne ĝuas la frukton de sia laboro; multaj el ili dum vintro ne povas trinki vinon pro sia mizera situacio.

Ankaŭ la melonrikolto k tiu de akvomelonoj estas bela; ĉi tiu frukto estas multe konsumata de l' araboj. Oni vidas ilin kuniĝintaj triope aŭ kvarope en la stratoj ĉirkaŭ kelkaj melonoj, kiujn ili manĝas popece, kvazaŭ estus viando, kun peco da pano en la alia mano.

Sur la strato apud la vendejo troviĝas centoj da melonoj, kiuj aspektas



Arabaj vendejoj en Mostaganem (Oran)

kiel montoj el ŝtonoj, prezentataj al la loĝantoj por ludi per ili. La arabaj frukto-vendistoj dormas tri aŭ kvar semajnojn apud la fruktoj dumnokte sur la tero; multaj el ili eĉ ne kovras siajn korpojn dormante sub la blua cielo, kie la luno lumigas iliajn vizaĝojn brilantajn kiel speguloj. Ili tie restas trankvile. Nek la nokta mallumo nek la fortega suno de l' tago domaĝas iliajn fortikajn korpojn: ili vivas veran naturan vivon.

Iom pri la koloniaj armeoj.

En la koloniaj armeoj estas francoj, araboj, judoj, hispanoj. Ilin do formas la surlokaj loĝantoj. Aliflanke estas ĉi tien sendataj francaj soldatoj, dum partoj de la koloniaj armeoj estas transportataj Francion. Unu el la ĉefaj armepartoj estas la Fremdula Legio, kies sidejo estas en Sidi Bel-Abes. Grandaj afiŝoj alvokas tie sur la muroj la promenantojn rekrutiĝi tie, kie estas la „honora patrio“. Eble vere en tiu institucio oni trovas la tielnomatan „honoron“, ĉar por rekrutiĝi en ĝi oni ne bezonas pasportojn, de kie ajn oni venas, k ne bezonas diri, kion oni faris dum sia vivo. Eĉ fremdan nomon oni rajtas indiki al la rekrutanto.

Tiel troviĝas en tiu armeo multaj krimuloj drinkemaj, aliaj, kiuj ne deziras labori k restas tie por esti nutrataj k vestataj; ankaŭ estas iuj, kies revoj estas akiri honorojn, gloron ktp. Tiuj soldatoj estas ĉiam sendataj al danĝeraj k malsanigaj lokoj; tiel la francaj regantoj povas indulgi la vivojn de l' tien sendataj francoj.

Ankaŭ regas en tiu armeo tre severa disciplino kun gravaj punoj. Unu el la ĉefaj punoj estas, laborigi la punitajn soldatojn ĉe la konstruado de kazernoj aŭ de granda teatro, kiel oni faris en Bel-Abes, kie, dum multaj laboristoj estis senlaboraj, la estraro laborigis senpage soldatojn, ĉar punitoj nenion ricevas. La rekrutado al tiu armeo okazas por kvin jaroj, k la soldatoj ricevas dum tiu tempo 3—4000 frankojn, nutraĵon k vestaĵon. Multaj el ili restas pli longe (ok k dek jarojn) pro ricevitaj punoj, aliaj ree rekrutiĝas por ricevi pli da mono aŭ superan rangon.

En la Fremdula Legio multaj homoj, kiuj eble hejme estus en karcero, estas honorataj k pagataj de la sama popolo, kiun ili ofendis k kiu ne povas vivi por vidi tiujn honorigojn. Kie la legianoj promenas dum libera tempo, tie mi multfoje vidis soldatojn kun uniformo plena je honoraj medaloj; ili estis drinkintaj k insultis al ĉiuj promenantoj. Vera ekzemplo pri la „kulturo“, kiun posedas plejparte la fremdul-legianoj! (Daŭrigota.)

SAT-ano 15 316.

EN TENDARO DE JUNAJ LENINANOJ

(Bildoj el la vivo de la rusa laborista infanaro)

(Fino. Vidu la antaŭen n-on.)

La unuaj 8 tagoj estis tagoj de ordigo, aranĝo de ludplacoj, fosoj, purigo antaŭ k en la ejoj, ornamo de la ĉambroj. Oni aranĝis la kluban ĉambron k preparis artajn prezentaĵojn, korpkulturajn montrekzercojn, kurkonkuradojn ktp. Tiele oni preparis la solenan malfermon de la tendaro.

La soleno okazis la 12-an de julio. Alveturis gastoj el Nijni — membroj de la junkomunista komitato de la fabriko k gepatroj. El Vorotinec alveturis sekretario de la regiona junkomunista organizo. Ĉeestis membroj de la estraro de la agrikultura kolektivo, prezidanto de la loka soveto, reprezentantoj de la lokaj organizoj de la komunista partio k junularo. Alvenis multaj kamparanoj kun infanoj. La tagon komencis la flagleviĝo. La taĉmentestroj unuafoje solene raportis al la tendarestro. Ĉiuj junpioniroj surhavis uniformon kun ruĝaj kravatoj, ĉiuj estis ekscititaj k gajaj. Ĝis la tagmanĝo oni faris solenan kunvenon k parolis pri la signifo de la tendaro. Poste la infanoj faris artajn prezentaĵojn k organizis amasajn ludojn kun la gastoj el la vilaĝo. Post la tagmanĝo oni nur kun grandaj penoj povis kuŝigi la infanojn por tielnomata „morthoro“ (tempo de trankvilo k ripozo). Post la vespera tetrinko oni aranĝis komplikajn kurkonkurojn k korpkulturajn ekzercojn. Gajaj iris la infanoj vespere en la dormejojn, akompanate de la tambura „muziko“. —

La vivo en la tendaro pasis laŭplane.

La tago komenciĝis de la flagleviĝo (je la 7-a matene) antaŭ la ĉefdomo, kien venis el siaj ejoj ambaŭ taĉmentoj. La taĉmentestroj raportis pri laboro planita por la tago. Poste la infanoj faris korpkulturajn ekzercojn k iris matenmanĝi. Ĝis la tagmanĝo oni laboris aŭ faris diversajn ekskursojn k kolektivajn promenojn. La infanoj laboris en la vilaĝa agrikultura kolektivo sub gvido de specialaj instruantoj. Oni laboris en ĝardenoj (kolektado de beroj, pomoj k ĉerizoj) aŭ en kampoj (sarkado de lino k terpomoj). Post la laboro la instruanto rakontis al la infanoj pri ĝi. Oni laboris po 2 horoj tage 3- aŭ 4-foje semajne. Poste oni iris al proksima lageto por sin bani. Post la tagmanĝo (je la 2-a posttagmeze) sekvis la „morthoro“ k libera tempo. Post la vespera tetrinko — kluba laboro (ludoj, eldono de murgazeto, paroladoj). La junpioniroj faris ankaŭ socian laboron en la lernludejoj por la infanoj de la vilaĝanoj, kiam la vilaĝanoj laboris sur kampoj. La pioniroj organizis ludojn, kantojn ktp.

Post la vespermanĝo (je la 9-a vespere) la infanoj ekbruligis lignofajrojn ĉe la lageto, kantis k aŭskultis rakontojn de la taĉmentogvidantoj. Je la 10-a vespere — malleviĝo de la flago. La tendaro dormas.

La 5-an de aŭgusto okazis solena fermo de la tendaro. Ĉeestis multaj gastoj el Vorotinec, el la agrikultura kolektivo, sociaj organizoj ktp. Post salutparoladoj k raporto pri la rezultoj de la tendaro oni premiis la plej bonajn pionirojn — aktivulojn de la socia laboro k sportulojn, kiuj venkis dum la konkuradoj. Ĉeneroj (ĉenero estas taĉmentparto, nombranta 10 pionirojn) ankaŭ raportis pri sia laboro. La kunvenon sekvis artaj prezentaĵoj k fine la sportuloj konstruis belan sportpiramidon. La soleno daŭris ĝis la tagmanĝo. Vespere estis ankaŭ aranĝitaj korpkulturaj konkuradoj, kiujn ĉeestis tre multaj kamparanoj kun siaj infanoj. Fine venas la nokto. Oni lastfoje mallevas la flagon k la tendaro estas fermita.

La impresoj de la infanoj estas la plej bonaj. Multaj ne volis forlasi Fokinon. Ĉiuj alkutimiĝis al la organizita kolektiva laboro, komun-vivo k ripozo. La lokon oni forlasis kun granda bedaŭro. Dum tutaj tagoj la infanoj surhavis nur mallongajn pantalonojn. Ĉiuj bele sunbruniĝis. La bona k ĝusta nutrado faris sian influon. La infanoj venis en la urbon fortiĝintaj k organizitaj, ili lernis kolektive labori k ricevis multon da belaj impresoj.

Oni forveturis la 6-an de aŭgusto. La vaporŝipo „Frederiko-Engels“ foriris je la 16-a horo. La vetero estis bela k la infanoj kun intereso observis la bordojn de l'Volga, la brilantan supraĵon de la akvo k la lertan flugadon de mevoj. Sed jen jam estas videbla Nijni. Baldaŭ — hejme ...

Vaganto. (Laŭ rakontoj de partoprenintoj).

LA PARIAOJ EN HINDIO: LA „NETUŜEBLULOJ".

La plej lasta konflikto inter Gandhi k la brita registaro atentigis la mondon refoje pri la situacio de la tielnomataj „netuŝebluloj" en Hindio, per kiu esprimo oni nomas la tiean plej malsuperan, plej mizere vivantan homklason. Sur la plej malalta ŝtupo en la malsimpla ŝtuparo de l' hinduan-religiaj kastoj k multe sub ĉiuj aliaj kastoj troviĝas la kasto de l' „netuŝebluloj". Ili konsistigas 20% el la tuta loĝantaro de Brita Hindio k kelkajn 30% el la hinduana popolparto. Ilia origino estas parte profesia k rezultas de tio, ke iuj metioj (kloakpurigistoj, ledlaboristoj ktp.) estis konsiderataj kiel malpuraj, k parte „triba", t. e. indiĝenoj sklavigitaj k ensorbitaj de l' hinduanismo restis en ĝi speco de sklavoj. Ilia karakterizo estas, ke ili, por la ortodoksa hinduano, malpurigas per sia kontakto la personojn, la nutraĵon k la akvon.

Ankaŭ oni malpermesas al ili eniri la hinduanajn templojn; ili estas plej malsupre ĉe la socia ŝtuparo k plej ofte plene analfabetaj. En la vilaĝoj ili vivas izolite, en aparta kvartalo, k ofte nutras sin per restaĵaĉoj k rubo; ordinare ili estas okupataj kiel taglaboristoj de grandbienuloj-hinduanoj aŭ en fabrikoj, k eĉ en la industrio ne malofte okazas, ke oni okupas ilin nur en aparta ejo. La hinduanoj malpermesas al ili aliri putojn de ili uzatajn, eĉ se la komuna prizorgado estas instalita per publikaj monsumoj. Ĉe riveroj la netuŝebluloj devas ĉerpi la akvon pli malsupre en la fluo.

En la lernejoj la infanoj de netuŝebluloj devas sidi aparte, ofte eĉ ekster la lernejo, k aŭskulti la lecionojn tra la fenestro, sub la suno aŭ en la pluvo. Ekzistas iuj regionoj (ekz. Madras k Malabar), kie la netuŝeblulo ne rajtas alproksimiĝi hinduanon alirangan trans difinitan distancon; li devas averti lin, kriante de malproksime, k fari grandan ĉirkaŭvojon tra la kampoj por resti je la distanco postulata de la religio. Kvankam la tribunaloj estas malfermitaj por ĉiuj, la netuŝebluloj iafoje ne riskis sin prezenti antaŭ la juĝisto, pro timo pri venĝemo.

La plej bedaŭrinda afero estas, ke la netuŝebluloj ĝenerale ĝis nun akceptas sian sorton kiel naturan k neeviteblan.

Atentigo

SAT povos likvidi siajn ŝuldojn, ŝtopi la breĉon, unuvorte retrovi sian financan ekvilibron nur per severa, ĉiurilata ŝparado. Tial ni aperigas ĉi tiun n-ron nur okpaĝe. La manko de 4 paĝoj estas cetere pli ol kompensita per la fakto, ke la lasta n-ro de „La N. E." estis 20-paĝa k ankaŭ per tio, ke la protokolaro en la du antaŭaj n-roj estis kompostita per malgrandaj litertipoj.

Ni estas certaj, ke la legantoj konsentos al tio k ke plie ili varbos, senlace varbados novajn abonantojn, por ke kiel eble plej baldaŭ ni povu certigi regulan aperadon de dekdu-paĝa „S-ulo" k dudek-paĝa „La N. E.".

La klasbatalo tra la mondo

El Usono.

Post 2-semajna proceso oni la 1. sept. kondamnis al 9-monata enkarcerigo 6 Gek-dojn: Mejer, Belin, Etel Del, An Devis, Ben Buts k Ed Pamer. La preteksto estis „maltrankviligo de paco k publika kunveno." Ili manifestaciis por liberigo de Tam Muni (Tom Mooney) dum la fermaj ceremonioj de l' Olimpiaj ludoj. Antaŭ la 100 000-persona ĉeestantaro la atlete vestitaj gejunuloj saltis el siaj sidlokoj sur la kurejon kriante: „Liberigu Tam Muni-n!" Kvar ĉirkaŭkuris la stadion, antaŭ ol ili estis arestataj; du, kiuj portis grandan afiŝon kun surskribo pri Muni, baldaŭ estis kaptataj. Aŭdiĝis mal- k -aplaŭdoj el la homamaso.

Juĝisto Klark (Clarke), favorato de gubernatoro Ralf (Rolph), kiu antaŭ nelonge rifuzis liberigon al Muni, helpe de l' persekutisto, „ruĝskadr"ano Felps (Phelps) k burĝa ĵurantaro, nur bedaŭras, ke la leĝo ne permesis pli severan punon. Tamen li sukcesis pligrandigi la punon de Gek-doj Belin k Del pro „malestimo por tribunalo" per 100-taga malliberigo por Belin k 50-taga por Del. La dolarkonsciaj organizoj kiel la Komerca Ĉambro, la faŝista Amerika Legio ktp. elkore aplaŭdas lian moŝton.

Diris ĉeestantino: „Neniam antaŭe mi vidis la klasbatalon tiom klare, kiom dum ĉi tiu proceso. Oni vidis ĝin, aŭdis ĝin, sentis ĝin. Kiam 16-jara burĝo finis atesti, lia moŝto afable rimarkis: ‚Vi ĉiuj ĉesu esplori, ĉar la junulo pretas iri ferion.' Gest-elokvente Leo Galeger (Leo Gallagher), la defendadvokato, dum 10 jaroj leĝinstruisto ĉe Sudokcidenta Universitato k nun maldungita pro sia aktiveco kiel advokato por laboristoj, respondis: ‚La burĝon al ferio; la laboriston al proceso.' "

SAT-ano.

El Germanio.

Okaze de l' internacia junulara tago estis aranĝita de l' komunistoj en Ŝtutgart impona *kontraŭmilita manifestacio*, kiun ĉeestis (en la plej granda kunvenejo) almenaŭ 12 mil personoj. Ĉar en Germanio regas nun reakcia registaro el nobeloj, ne rajtis paroladi eksterlandaj Gek-doj, kiuj trapasis Ŝtutgarton revenante de l' Amsterdama Kontraŭmilitista Kongreso. La polico motivigis la malpermeson per la deklaro, ke paroloj de eksterlandanoj povus endanĝerigi la ordon k trankvilon en la urbo. Tion kuraĝas eprimi ŝtata instanco en lando, kie preskaŭ ĉiutage proletoj estis mortigitaj de faŝistoj sur publikaj stratoj! Dum la manifestacio tre impresis „revuo" de l' proleta verkisto d-ro Volf, kiu konkludis per admono al japanaj soldatoj rifuzintaj militservon, batali kune kun la laborularo kontraŭ la reganta klaso. La kontraŭmilita batalemo ne mortis en vastaj tavoloj de l'germania loĝantaro k baros la intencojn de l'generaloj.

Ulo.

Batalemo en la nederlanda parlamento.

Ĉe malfermo de l' parlamento, kiu okazas kutime ĉeeste de la reĝino, la du komunistaj parlamentanoj kriis: *For la reĝinon! For la malsatdiktatorecon de Ruis-de Geer.* Granda tumulto sekvis. Aliaj kontraŭmanifestaciis, sed la komunistoj daŭrigis, ĝis la reĝino forlasis la parlamentejon. Ĝis nun simila ago en Nederlando ne okazis. Tio montras, ke la komunistoj certe havas kuraĝon, por fari tion.

P. G. v. d. Plank, 16 794.

La Lankaŝira katunstriko.

Post kvarsemajna striko en la katunindustrio, kiun partoprenis pli ol 200 mil laboristoj, la mastroj sukcesis relaborigi siajn dungitojn kun salajra malaltigo de 17%. En Nelson k Koln (Colne) la strikantoj ne konsentis al la decido k ankoraŭ ne ĉesigis la strikon. 4305.

Sennaciema spirito.

En Koventri (Coventry) oni maldungis fraŭlinon B. Ajlŭard (Aylward), instruistino, pro tio ke ŝi rifuzis partopreni en Imperi-taga manifestacio. Estas ŝia protesto kontraŭ la mallarĝa naciismo, kiun geinstruistoj devas instrui al la infanoj. Simpatiantoj gratulu, skribante al jena adreso: Miss B. Aylward, *Coventry* (Anglio).

L. Rosenbloom (4305).

LA LERNANTO

por oktobro estos aldonata, pro la 8-paĝeco de tiu ĉi n-o nur al la n-o 396.

DISKUTEJO:

Pri „Laboristaro k monpolitiko“.

Al supratitola artikolo en la n-o 392 mi respondas jene: Nezorgema, mallerta aŭ senskrupula kuracisto malaperigas la ekzantemon de la supraĵo de l' korpo, anstataŭ esplori la veran kaŭzon de la malsano k elfunde malebligi la veneniĝon. La mono ne kaŭzas, nur elmontras la ekspluatadon: La salajron ricevanta laboristo spertas, ke tiu mono, la rezulto de lia penado, ne sufiĉas por aĉeti la bezonaĵojn. Sed ne la mono estas maltaŭga. Ne la monsistemon klopodu ŝanĝi: la salajrosistemon ni volu ĉesigi. Ŝanĝante la monsistemon vi neniam ĉesigos la ekspluatadon, eĉ ne sukcesos malakrigi la terurajn efikojn de l' salajrosistemo.

Vi proponas: „La mono ne plu devas esti dependa de la oro; la mono devas perdi de la valoro.“ Ĉu eble ia putrema, difektiĝema materialo? Tiu mono jam tute ne estus mono=peranto de l'ekonomia cirkulado. Por ke la mono povu plenumi sian taskon (perantan), ĝi devas esti sufiĉe fidinda, konstanta, garantia, kiel eble plej sendependa de hazardaj ŝanĝiĝoj. Manko de firma, nevariebla monmaterialo malhelpus, eĉ tute malebligus la varcirkuladon, sekve ankaŭ la produktadon (kiel ni vidas hodiaŭ pro malfacile havigeblaj devizoj).

Diversaj industrioj (ne nur juvelistoj) prilaboras oron, kies valoro, kiel ĉe ĉiu varo, varias laŭ debito k oferto. Pro siaj fizikaj k ĥemiaj ecoj la oro servas kiel monmaterialo. La ormono tamen ne tial estas valora, ĉar ĝi konsistas el tiu metalo. La monvaloro kuŝas en la ekonomio. Mono esprimas rezulton de laboro. Bankbileto aŭ ormono reprezentas parton de la laborrezulto en iu lando. Laŭ tiu rezulto oni taksas la valuton de iu lando. Mono signifas ankaŭ kapitalon, ĉar kapitalo estas amasigita laboro. Sur la kapitalo-merkato (monmerkato) oni taksas la valoron de iu valuto laŭ ĝia ekonomia valoro. Pagon per ormono eksterlande oni tamen taksas laŭ pezo, orenhavo, *varvaloro* de la oro. La rolo de la ormono eksterlande diferencas de tiu enlande. Hejme la ormono estas mono; eksterlande ĝi estas nur varo.

Nin proletojn tute ne interesas tiu sufiĉe malsimpla procedo. Ni suferas ankaŭ pro la ŝanĝiĝoj de la monvaloro. Sed ni ne volas *plibonigi* la rilatojn en la kapitalismo, kiun ni kontraŭbataladas. Nia liberiĝo estos ebla nur per la ĉesigo de la salajrosistemo. Aŭ ĉiom — aŭ neniom! Plibonigo per partopago ne eblas.

„La rentumo signifas grandan ŝarĝon por la produktado.“ Tiel ploraĉas la entreprenistoj. Ni scias, ke la rentumo estas parto de la plusvaloro, kiun forrabas la entreprenisto el la laborista laborprodukto. Poste li devas pagi parton de sia rabaĵo al la uzuristo, kiu pruntedonis al li monon. Ĉu riĉa entreprenisto. kiu ne bezonas prunti monon k pagi rentumon, malpli ekspluatos siajn laboristojn?

„La hodiaŭa ekonomio estas kreditekonomio k pro tio ĝi estas dependa de la mono.“ Ĝuste male! La kreditekonomio tute ne dependas de la mono. Ju pli oni sukcesis plenkonstrui la kreditsistemon, des malpli oni bezonas monon. La ĝirobanko facile aranĝas la aferojn; eĉ la diferencojn oni ne pagas per kontanta mono. Oni bezonas ĝuste la kreditsistemon, kiam la varproduktado k -cirkulado estas tre viglaj k la tutmonda orprovizo ne sufiĉas. Aliparte vane oni amasigas bankbiletojn: tiom malpli ili valoras. —

K-do! Mi miras pri via aserto: „. . . tiu teoriulo (Marks) ignoris la monproblemon.“ Longajn ĉapitrojn enhavas „Kritiko pri la politika ekonomio“ k la unua volumo de „Kapitalo“, en kiu Marks funde pritraktas k detale elmontras la aperaĵojn en la vivo de la mono. Riproĉe vi mencias, ke „tiu teoriulo“ (!) ne kreis „kontraŭkapitalisman monsistemon“. Kiel vi imagas tiun mirindan, strangan ion? Ĉu eble kiel varmegan glaciaĵon, aŭ hejtitan glitkurejon?

„Kiel povas foriĝi la rentuma esenco en la mona problemo?“ vi fine demandas. Kiam ne estos ekspluatado, ne estos rentumo, ĉar rentumo estas parto de l'plusvaloro. La etbienulo ne okupas laboristojn, tamen li pagas rentumon al la uzuristo. Li ekspluatas sin mem k siajn familianojn. Ekspluatanto k uzuristo estas la sama persono. Aktoroj k scenejoj varias: la terura tragedio restas la sama.

Jozefo Denes (17 418).

TRA ESPERANTIO

Pri korespondantoj kun sovetiaj Kamaradoj.

K-do P. G. van der Plank el Nederlando sciigas, ke ĝis nun li bone sukcesis korespondadi kun K-doj el Sovetio. Li eĉ sendis siajn leterojn en kovertoj, sur kiuj troviĝis la nomo SAT, k „S-ulo“-n kun la titolo tute videbla. Ni ĝojas pro tiu informo k denove konsilas, ke kiel eble plej da K-doj informu la Sovetianojn pri nia movado, havigante al ili niajn eldonaĵojn.

Ni tamen devas rememorigi, ke ni posedas multajn leterojn de K-doj, al kiuj estas senditaj SAT-eldonaĵoj k kiuj neniam atingis la adresitojn. Ni plie posedas banderolojn kun poŝta stampo de pakaĵoj el SAT-libroj k gazetoj senditaj rekomendite k kiuj revenis al la sendintoj el Francio k Germanio kun la mencio en franca lingvo: „Retour comme interdit par l'Administration pour les ouvrages de presse.“ Ni neniam kulpigis la Sovetian regnon mem, al kiu SAT ĉiam rilatis tute lojale, pri la nenormala nuna situacio. Respondecas pri ĝi la C. K. de SEU, kiu volis ŝirmi sin kontraŭ niaj ĝustaj k justaj kritikoj. Ni ŝatus ekscii, ĉu aliaj K-doj estis same bonŝancaj kiel K-do P. G. van der Plank.

Kiel adresi poŝtaĵon al Norda Ameriko?

Pro la malsamaj skribmaniero k adres-sistemo en Norda Ameriko kompare al tiuj en la cetera mondo, la al Usono k Kanado adresitaj poŝtaĵoj ofte vagadas tre longan tempon k fine eble revenas al la sendinto aŭ tute perdiĝas, ĉar precipe la eŭropaj korespondantoj tre ofte malkomplete adresas tien sendatajn poŝtaĵojn.

Unue: tre gravas, ke la nomo de la ŝtato, ĉu tute, ĉu mallongigite, estu notita. En la 48 ŝtatoj de Usono estas multegaj samnomaj urboj; iafoje eĉ 25—35 urboj aŭ urbetoj tra tuta Usono havas saman nomon. Oni kutime skribas la nomon de la ŝtato mallongigite; ofte sufiĉas 1—2 literoj por indiki la ŝtaton, en kiu la adresita urbo troviĝas. Ekzemple: NEWARK, N. J., NEWARK, O., BROOKLYN, N. Y. BROOKLYN, Conn. La mallongigoj estas tute oficialaj k signifas la nomojn de la ŝtatoj: New Jersey, Ohio, New York, Connecticut. Sen tiuj literoj la adreso estas malkompleta, k la poŝtaĵo tute ne aŭ nur malfacile trafas la adresiton.

Same estas pri stratoj, kiuj havas 2 numer-vicojn distingatajn per E/ast, W/est, N/orth aŭ S/outh (= oriento, okcidento, nordo, sudo). En tiaj stratoj aŭ en avenuoj estas 2 samaj domnumeroj; ekz. en la 81-a strato la aldonoj „EAST“ aŭ „WEST“ indikas la orientan aŭ la okcidentan parton de la strato. En Nov-Jorko ekz. estas jenaj tre malsamaj adresoj:

101,	EAST,	11-th Street
101,	WEST,	11-th Street
101,	—	11-th Avenue.

Se oni malkomplete aŭ fuŝe skribas tiujn tri adresojn, pli ol certe la poŝtaĵo ne trafos la adresiton. La subskribinto jam ofte spertis, ke pro ŝajne bagatelaj fuŝskriboj de la adreso la poŝtaĵo ne estis ricevata, aŭ ĝi vagadis de loko al loko, ĝis fine ĝi trafis al la ĝusta adreso.

Erara livero de la poŝtaĵo povas okazi ankaŭ pro la malsammaniera skribo de l'ciferoj en Norda Ameriko. Tio rilatas precipe la ciferon 1. En Norda Ameriko oni skribas ĝin kiel simplan strekon (/) sen ia alstreketo de kapo pendanta. En Norda Ameriko oni skribas la ciferon 7 preskaŭ sammaniere, kiel en Eŭropo la ciferon 1. La poŝtistoj en Norda Ameriko estas certe atentigitaj pri tio, tamen fuŝlivero de poŝtaĵoj ofte okazas pro tiu bagatela diferenco en la skribmaniero.

Okazis al mi antaŭ nelonge, ke malnova amiko esperantista, hungaro, kiu vojaĝis de Sud-Usono al Filadelfio, post la alveno tien sendis telgramon al mi: „VENU TUJ FILADELFION POR RENKONTI MIN, POST DU TAGOJ MI REVOJAĜOS EŬROPON". La telegramo ne trafis min, ĉar ĝi estis liverita al *350, E. 87* anstataŭ al mia ĝusta adreso: *350 E. 81.* Oni reliveris la telegramon al la sendinto. Sed estis jam tro malfrue por korekti la eraron: mia amiko, kiun mi sopirege deziris renkonti, devis revojaĝi al Eŭropo ne vidinte min pro tiu bagatela eraro, la diferenco inter la eŭropa k la nordamerika cifero 1. Nord-Amerikaj esperantistoj trafe skribus siajn adresojn NEPRE preslitere precipe la unuan fojon k atentigu siajn korespondantojn pri la gravo de ĉiuj mallongigoj en la adreso.

Bonesper, Nov-Jorko.

Informoj de Socialista Frakcio.

Raporto pri la kunsido okaze de la 12. SAT-kongreso en Ŝtutgart.

La kunsidon ĉeestis 39 Gek-doj. Prezidis K-do Azorin, kiu ankaŭ raportis nome de la estraro. Al la Frakcio anoncis sin ĝis 1. 7. 32 1400 Gekdoj loĝantaj en 17 landoj. K-do Johanson laŭtlegis 2 leterojn de K-dino Klatil, kiu bedaŭre ne povis veni. Kiel sekretariino ŝi sendis cirkulerojn al ĉiuj perantoj k raportis tiel regule pri la stato de nia movado k farendaj taskoj. K-do Grime (Grimme), respondeca pri la gazetservo, plendis, ke ĝi ne jam funkcias bone pro manko de regulaj k sufiĉe multaj kunlaborantoj. Li deziras ricevi artikolojn taŭgajn (ankaŭ pri esp-o) k pruvekzemplerojn de la koncernaj gazetoj.

La diskutoj estis tre viglaj k interesaj. Partoprenis ilin Gek-doj Fen (Veen), Aarse, Olson, Puf, Johanson, Azorin, Grime, Dojbler (Deubler), Kuhnt, Zehrer, v. d. Hajd, k a. La rezulto de la diskutado estis: 1. Kotizo por la Frakcio ne estas pagenda; la K-doj plenumu siajn taskojn specialajn en la kadro de sia loka grupo aŭ SAT-rondo. Monkolekto inter la ĉeestantoj por la sekretario rezultigis sumon de 24.— m. g.

2. La estraro prilaboru laborprogramon, k konigu ĝin al la anoj de la Frakcio.

3. K-dino Klatil estu komisiata prilabori siajn enketojn pri esp-o kiel varban broŝuron, k interkonsentu kun SAT k simpatiaj LEA-oj, ke tiu ĉi broŝureto estu presata.

4. La Gek-doj kunhelpu, ke SAT restu unueca organizo, k ili evitu ĉion, kio povus veki ideon, ke nia Frakcio povus aŭ celus esti ĝermo por speciala organizo.

Rezulto de la novelektoj: Prez. K-do Azorin, Kordobo (Hisp.); sekr. Dojbler, Munĥeno (Germ.); gazetserv. K-do Grime, Vieno (Aŭstrio); virinfako: K-dino v. Essen, Marken Binnen (Nederl.); konsilanto: K-do Aarse, Amsterdam.

Kantinte la Internacion, la Gek-doj adiaŭis promesante labori laŭ la devo de klasbatala socialisto.

Aldono: Kiel sekretario de nia Frakcio mi salutas la Gek-dojn, alvokas ilin por fervora laborado por nia komuna celo, k estas konvinkita pri la finvenko de laborista klaso! „S-ulo" disponos al ni, kiel al la aliaj frakcioj el SAT-anoj lokon por publikigi niajn informojn. La organoj de LEA-oj estas petataj ilin represi.

Sennaciece „Amikecon!"
Konrad Deubler, *München 13*, Arcisstr. 48/II.r, Germ.

Kunveno de la Sennaciista Frakcio

okaze de la XII-a SAT-Kongreso en Ŝtutgart

La kunveno okazis la 9-an de aŭgusto. Ĉi-jare K-do *Dann* (Nov-Jorko) legis la kutimajn raportojn de l'Sekretariaro. Poste aliaj frakcianoj konigis siajn spertojn.


Montriĝis, ke ankaŭ en la pasinta jaro la membrostato pliboniĝis. Dum la diskutado la ĉeestintoj klare esprimis, ke ĝuste en nuna momento, kiam furiozas tra la tuta mondo naciisma ondego eĉ en proletaj rondoj, la sennaciistoj devas ankoraŭ pli vigle disvastigi siajn ideojn. *Ili devas ĉiam denove per ekzemploj pruvi al la laboristaro ke la nacia liberiĝo povas profiti nur al la burĝa klaso, sed ne al la proleta: nur la klasbatalo liberigos ĉi lastan el la ungegoj de l'kapitalismo.* Estis krome konstatite, ke tre multaj proletaj esperantistoj fakte jam delonge *nekonscie* agas laŭ la principoj de la sennaciistoj, kio finfine estas la natura sekvo de l'esperanto-praktikado. Tamen la frakcianoj ne vivas en la iluzio, ke la sennaciistoj baldaŭ formos amasan movadon. Necesus ja, ke la laboristoj klopodu al laŭindustria, ne internacia, sed tutmonda organiziĝo. Sed kondiĉo por tia spiritostato estas, ke la laboristoj multnombre eklernu esp-on.

Ĉar la sennaciismo estas de la frakcianoj konsiderata kiel sole solida bazo idea por propagandi esp-on, estos baldaŭ aperigata franclingva eldono de la „Manifesto de la Sennaciistoj". Alilingvaj tradukaĵoj ankaŭ jam estas preparataj, la angla estas jam prespreta. Por la nacilingvaj eldonoj verkis antaŭparolon *L. Barbedet*, profesoro pri filozofio k bone konata en la avangardaj medioj el Francio.

Estis faritaj kelkaj gravaj decidoj i. a., ke *neesperantistoj* ne povos esti akceptataj en la Frakcio. La „Sennaciista Bulteno" estas eldonota regule ĉiun duan monaton. K-do Veder (Nov-Jorko) rezignis je la sekretarieco. Kiel nova sekretario estas elektita unuanime K-do H. Wagner, *Stuttgart*, Bismarckstr. 140 II, Germanio; kiel kasisto funkcios K-dino Wagner (sama adreso). Sennaciistaj Frakci-Perantoj estas jenaj K-doj:

L. G. Avid, 19 bis, J. B. Baudin, *Villejuif* (Seine), Francio.
F. Faulhaber, Maratonweg 15/2. *Amsterdam*, Nederlando.
W. Kubik, Hölle 2, *Schweinfurt*, Germanio.
H. Walker, 25 Ash Rd, Grimthorpe Terrace, *Leeds*, Britio.
St. Rostoniec, Piekna 52—28, *Warszawa*, Polio.
E. Artigas, Paseo del Ebro 62, *Zaragoza*, Hispanio.
J. Stadler, Vejprnicka, 97, *Plzen 9*, Ĉeĥoslovakio.
Nuno F. Diaz, Rua Joaquim Casimiro 38/1a dto, *Lisboa*, Portugalio.
T. Veder, 24—29 Merchant St., *Astoria*, L. I. N. Y., Usono.

11 067.




Vi povas fari gravan servon al nia movado, plivaloriganta la sciencan bibliotekon de SAT. Tiucele vi ebligu la eldonon de

Fremdvortoj en Esperanto

de Paŭlo Neergaard

per antaŭmendo de unu aŭ kelkaj ekz-oj. La eldono estas certigata, se venos almenaŭ 300 antaŭmendoj. La prezo estas 1 krono dana k la pago postulata nur ĉe la apero de la libro. Ne prokrastu fari vian antaŭmendon, skribante al

Dates Bogtrykkeri
Gl. Kongevej 13, Kopenhago V
(Danio)



EN NIA MOVADO

KRONIKO

Britio. *Leeds.* Sub gvido de K-do L. B. stariĝis tri esp. kursoj ĉe la Kooperativaj (lab.) studrondoj en distriktoj Rothwell, Hunslet k Middleton. Sume estas 70 gestudantoj. Germanio. *Ŝtutgart.* La SAT-Kongreso havis bonegan propagand-efikon; por multaj proletoj ĝi estis okulfrapa pruvo pri taŭgo de esp-o ne nur kiel interkomprenilo, sed ankaŭ kiel batalilo por la laboristaro. Ekde okt. okazas 3 kursoj en Ŝt. k antaŭurboj. Antaŭvideble ni povos aranĝi pliajn. La SEA-broŝuro de K-do Lanti „La Lab. Esp-ismo" trovis bonakcepton en lab. medioj. Ni vendos ĝin inter la kursanoj. Regula kunveno ĉiumarda en Metalista Hejmo. — *Ulo.* Nederlando. La distrikto Amsterdam starigis „lab. esp-istan Universitaton", komenciĝintan la 18. sept. k daŭrantan 15 tagojn dum sume 30 horoj, ĉefe pri esperant-movadaj temoj, por ĉiuj sekcioj. K-do de Bruin (Enschede) parolis pri SAT (24. 9.) — Ĝis nun 27 el 59 sekcioj de la Nederlanda LEA elektis SAT-peranton. *Roterdamo.* La SAT-anaro priparolis je la 9. IX starigon de SAT-rondo, por pli energie propagandi por SAT. K-do Bout estas loka peranto. Svedio. La sidejo de S.L.E.A. estas nun translokita en centran lokon de *Stokholmo* (Norda relvoja placo), kie troviĝas la ĉefkonstruoj de la sveda lab. movado. La nuna adreso estas: *Upplandsgatan 1,3, Stokh.* Usono. La Lab. Esp. Grupo en *Los Angeles* disdonis dum aŭgusto inter laboristoj 1000 flugfoliojn pri kurso, kies instruanto estas SAT-ano. (Oni uzas la novan „Petro"-n.) Sub la titolalvoko troviĝas i. a. traduko de l'teksto uzata sur la banderolo de „S-ulo". „The Los Angeles Citizen" presis la tuton. En sept. 2500 aliaj reklamiloj estas pretigitaj.

SAT-ano.

EKSTER NIA MOVADO

La Direkcio de l'Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj aranĝas oficialajn 6-monatajn esp. kursojn, kies viziton ĝi rekomendas al ĉiuj fervojistoj.

La 25-a Universala Esperanto-Kongreso („Jubilea") okazos en Kolonjo (Köln) de 29. julio — 5. aŭgusto 1933, laŭ oficiala invito de la ĉefurbestro, d-ro Adenaŭer, prezidanto de la Prusa ŝtata konsilantaro.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

De *Ekrelo, Leipzig:*

J. Stalin: Fundamentoj de Leninismo. El la rusa trad. G. Stelliĥ. — 124 pĝ. Formato: 12 × 16. Prezo: 1.— mk.g. Lekcioj legitaj en Sverdlova Universitato (1924).

Kiam Lenin ankoraŭ vivis, oni ne parolis pri leninismo; oni estis simple marksisto, aŭ por distingi sin de la socialdemokratoj, nomis sin „revolucia marksisto". Stalin klarigas, ke leninismo estas plua disvolvo de l'marksismo en la nuna periodo de l'imperiisma kapitalismo. Ni ne povas esplori ĉi tie, ĉu Lenin iniciatis vere novan ismon, aŭ ĉu li ne simple aplikis lerte la instruojn de Marks al la cirkonstancoj en Rusio. Pri tio ekzistas opinidiverso. Estas iuj interesaj ĉapitroj en la libro (ekz. pri la *nacia problemo:* leninismo agnoskas revoluciajn kapablojn en interno de naciliberiga movado de premegataj landoj).

La lingvaĵo estas ĝenerale komprenebla, la stilo tamen iafoje peza. Div. vortojn *(konspekto, domini)* oni ne trovas en la *Pl. Vortaro.*

N. B.

Profesoro L. Jirkov: Kial venkis Esperanto? Studo. Form. 12×15. — 40 pĝ. Prezo: 0.30 mk. g.

Jirkov vidas en esp-o la „solan nuntempe ekzistantan lingvon pretan ideologie k praktike por esti enkondukata kiel „helpa" lingvo internacia." Ĝi venkis laŭ J., ĉar ĝi estis elprovata k montris sin vivanta k taŭga por esti uzata en la batalo. Li skizas la evoluon de l'mondlingva problemo k severe kondamnas idon.

*

Universala Terminologio de la Arkitekturo (arkeologio, arto, konstruo k metio) kun 2000 desegnoj de *Francisko Azorin*, arkitekto. Form. 14×20 cm.; presita de la firmo *Chulilla* y *Angel*, Madrido.

Jam 128 pĝ. de tiu verko estas presitaj k oni sekve povas prijuĝi ĝian valoron. Nedubeble nia K-do faras al la esp-a movado tre gravan servon. Ĉar la libro ne estas finpresita, ni simple mencias la laŭdindan entreprenon, por ke la interesiĝantoj eksciu pri ĝi.

Nia Lernolibro (ons Leerboek) voor de Internationale Taal *Esperanto* voor Jac. Lem jr. Form. 12×21 cm. 196 pĝ. Prezo: 1 floreno. Eldonejo: Fed. van Arb.-esperantisten, Valentijnkade 2, Amsterd.-Oost. Poŝta ĝiro 111 278.

Niaj nederlandaj K-doj nun havas sendube bonan lernilon, kio faciligos al ili la esperantistigon al ĉiam pli multnombraj laboristoj.

Prospekto de Grupo Laborista Esperantista en Valencia (Hisp.). 8 pĝ. Form. 15×21. Kun bildo pri grupkunveno k hispanlingva propaganda teksto. Same: diverskoloraj propag.-afiŝetoj. Adreso de l'grupo: Embajador Vich, 13, 1. *Valencia.*

Hungara ŝlosilo, menciita sur p. 248 (en la n-o 394), estas eldonita de *Literatura Mondo*, Budapest, laŭ normoj de ICK. Prezo: 0.18 sv. fk.

Goethe, Romaj Elegioj. La Taglibro. Espigis *K. Kalocsay.* Eld. Literatura Mondo, Budapest. 1932. Prezo: 1.80 mk. g., bind. 2.65 mk. g. Du versaj verkoj kun erotika poezio. Kun ilustroj de Stefano Barta.

MEMORNOTO

Pri la SAT-Kongreso raportis:

Volksstimme, Hagen, 3. 9. (granda interesa priskribo); *Pfälz. Freie Presse*, Kaiserslautern, 20. 8.; *Volkswacht*, Regensbg., 20. 8.; *Fränk. Tagespost*, Nürnb., 20. 8.; *Schwäb. Volksztg.*, Augsburg, 20. 8.; *A.-I.-Z.*, Berlin, 11. 9. (n-o 37), bildo kun la partoprenintoj sub „El la lab. movado" [1]. *Südd. Arb. Zeitg.*, Stuttg., 13. 8. (insulta rap. de l'opoziciulo Ŝvarc).

Prisper. artik. k notojn enhavis:

Münchener Post, 20. 9., *Volkszeitg.*, Düsseldorf, 29. 9.

[1] Komunist-tendenca ilustr. gazeto.

Korekto en la Protokolaro.

En p. 10 de la Kongres-protokolaro („S-ulo" n-o 393) oni legu korekte la citon el „La Socialisto", kiun faris K-dino Falkenher, jene: „Ĉi-jara kongreso havas la *grandan taskon*, firmkonstrui la bazon de SAT, firmigi ĝian fundamenton k fari *tiujn* decidojn, kiuj estas necesaj . . ." (anstataŭ: la Kgr. *devas* fari *tujajn* decidojn . . .).



Kion faras vi por la unuecfronto de la laborista klaso?

Helpu ankaŭ vi laŭ viaj fortoj propagandante la unuecsignon!

„Unuecfront"-glumarkojn liveras la presejo **Vetig, Gelnhaŭsen,** Germanio, poŝtĉekakonto: Frankfurt-Majn 18343.

Ĉe antaŭpago 100 ekz-oj 0,50 mk. g., 1000 ekz-oj 3,— mk.g. Ĉe sendado per poŝtrepago + 0,30 mk.g.

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. — Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

AŬSTRIO

K-do Anton Huber, *Aigen Abf. 43 b. Salzburg*, interŝ. PI, kĉl. Gek-doj.

FRANCIO

K-do *Eduardo Sagay*, 17, rue Pareire, *Narbonne* (Aude), letere pri Ekonomio k scienco kun germ. k katalunaj Gek-doj.

HISPANIO

K-do M. Romeu, Str. Horta Nova 65, *Sabadell*, kĉl, pri ĉ. temoj.

K-do P. Escayol, Str. Avenida 14 de Abril 6—8, *Rubi*, petas materialon por ekspozicio.

NEDERLANDO

K-dino C. v. d. Meulen, Vespuccistr. 54/II., *Amsterdam (W)*, koresp. kĉl. Gek-doj, L, PI, gaz., fotoj. Certe respondos.

K-do B. Blik, Vrolikstraat 50 hs., *Amsterdam (O)*, dez. ricevi L, PK, PI el ĉ. landoj. Nepre resp.

PORTUGALIO

La anoj de la esp. grupo „Liberecvojen", *Alhos-Vedros*, dez. koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Ĉiam respondos.

SVEDIO

3 tipografistoj dez. koresp. kun fakanoj ĉl., interŝ. pensojn, akt. okazaĵojn, fotojn k gaz. pri nia metio ktp, por uzi en nia Sv. Tipogr. gat. Adr.: La Stelokamaradoj, poŝtkesto 798, *Stockholmo I.*

Atentu!

La Utreĥta Lab. Esp. Grupo aranĝos la 15-an de novembro 1932 letervesperon. Ni petas sendi L, PK, PI el ĉ. landoj, pri ĉ. temoj. Skribu multnombre! Ni nepre respondos. Adr.: K-do J. Alta, Rijnlaan 133, *Utrecht* (Nederlando).

Halo! Halo!

La Esperanto-Klubo en Hässleholm aranĝos la 31. 10. 1932 letervesperon. Respondo garantiata. Adr.: „Letervespero 31. 10.", K. E. Flemström, Teknika Lernejo, Hässleholm (Svedio).

La Memoron PLIFORTIGAS k PERFEKTIGAS laŭ metodo trifoje premiita de la Pariza Akademio Prof. de mnemoniko **D. FAJNŜTEJN-VILNO,** Zawalna 15 (Pollando).

Dank' al mia metodo, bazita sur leĝoj de **psikologio, fiziologio, logiko k pedagogio, la MEMORO restariĝas ĉe tiuj personoj, kiuj ĝin perdis, pliboniĝas ĉe tiuj, kiuj havas malbonan k perfektiĝas ĉe tiuj, kiuj havas bonan; samtempe foriĝas la DISTRECO k maldiligento, fortiĝas la VOLO k pliboniĝas ĉiuj psikaj kapabloj ĉe personoj ĉiuaĝaj.**

Postulu senpage prospektojn de la memorfortiga kurso en esperanto.

ENHAVO

	paĝo
La Usona Imperiismo	1
Imperiismo en Sud-Ameriko . . .	2
Sovetmovado en ĉiniaj provincoj .	2
Feria tendaro por senlaboruloj . .	2
Nombroj pri la mizeriĝo de la germana laboristaro	3
Generaloj, prelatoj k „demokrataj" regantoj festenas sur . . . kadavroputrejoj!	3
Letero el Norda Afriko	3
En tendaro de junaj leninanoj . .	4
La pariaoj en Hindio: La „Netuŝebluloj"	5
Tra Esperantio	6—8

Presejo Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)